# PENSEO

N-ro 124

Feb./2002

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 www.anteo.domainvalet.com


## La Vojo de Mi Irita

de **Risel Zhao Qing**

Estante kvindek-jarulo de nia lingvo, mi ankoraŭ memoras, ke mi la unuan fojon aŭdis pri Esperanto en la jaro 1938, kiam mi ĵus eniris en elementan mezlernejon. Tiam mi pruntis verkon de k-do Hujucz *Impresoj pri Moskvo,* en kiu li rakontis kiel li, revenante al la patrujo tra la ĉefurbo de Sovetio, pere de helpo de la tieaj esperantistoj, akiris la vizon por restadi kaj vizitadi dum 7 tagoj, kio unue certigis al mi la efikadon de Esperanto. Poste, en 1943, kiam mi jam eniris la superan mezlernejon, mi eklegis la libron *Gvidlibro por Lerni Fremdajn Lingvojn* de k-do Chen Yuan eldonitan en Guilin, en kiu la aŭtoro pritraktis la lern-metodon de diversaj lingvoj kaj i.a. precipe akcentis tiajn trajtojn de Esperanto kiaj simpla fonetike, konciza kaj logika gramatike, esprimriĉa kaj facile lernebla, kio do instigis mian scivolemon kaj lern-volemon. Sekve mi tuj aĉetis lernolibrojn eldonitajn de Koresponda Esperanta Lernejo en Chongqing: *Milittempa Lernolibro de Esperanto,*de Zhong Xianmin, *Gramatiko de Esperanto* de Venlo Feng, *Klasifikita Vortaro de Esperanto* de Jak kaj komencis memlernadi kaj lernigi al aliaj samlernantoj.

La sekvantan jaron, kiam japanaj agresantoj invadis nian provincon, la loĝantaro de Guilin komencis evakuadon, mi kaj miaj familianoj fuĝis al urbo Yishan. Tuj antaŭ la fuĝado mi neatendite trovis kaj aĉetis valorajn esperantajn librojn ekz. *Paroladojn de Zamenhof,* esperantajn kurslibrojn verkitajn de Akita Uzuyaku kaj Osaka Kenzi, *Modernan Vortaron Esperantan-Japanan* de Ishiguro. Poste ni daŭrigis la fuĝadon al nia hejmloko Daxin, piedirante dum du semajnoj. Ĉiun tagon mi distris min per parkera recitado de esperantaj versaĵoj ekz. la kanto *Pri la Patrolando* el kolekto de esperantaj kantoj kompilita de k-do Eltunko. Kiam mi kantetis mallaŭte: "Vasta estas land' gepatra nia, ĝi plej riĉa estas sur la ter', en la mondo mankas land' nia, kie regus tia homliber'…", multe impresis min la admirinda esprimiveco kaŭzita de la fleksebleco de la vortordo, kio instigis min al mia aŭdaca esperantigo de kantoj dum pli posta tempo. Ĉiun vesperon dum ripozo mi ekzercigis min per tagnotado esperantlingva. Atinginte la cellokon, dumtage, kiam mi atendis relernigi en apuda lernejo, mi pasigis la tempon per legado de libro kunportita *Internacia Korespondado* (kompilita de Zhou Zhuangping kaj Zheng Zhuyi), kaj tiam ŝajnis al mi, ke mi spertis la ĝojon kiam mi mem ricevis la leteron. Kaj ĝuste pro tia sento ĉe mi ankaŭ naskiĝis la vojo praktiki mem korespondi estonte.



En 1947, mi eniris en Guangxian Universitaton por studi elektran teknikon, kaj dume lernigis Esp-on al samklasanoj, kiuj poste forlasis la studon pro manko de libera tempo, tamen mi mem neniam ĉesigis mian memlernadon de nia lingvo.

Du jarojn poste, Gujlin liberiĝis. La heroa Ĉina Popola Liberiga Armeo sendis al ni ne nur lumon kaj feliĉon sed ankaŭ la emociigan *Marŝon de PLA,* kiu subite ĉie disaŭdebliĝis, kio do ekinstigis ĉe mi la volemon ĝin enkonduki al diverslandaj batalantoj, tial mi komencis ĝian esperantigon. Tamen la liberiga milito ankoraŭ ne finiĝis tiam, sekve oni do trovis diversajn tekstojn, variantajn ĉefe ĉe la lasta verso. Tial la traduko estis prokrastita por preskaŭ 40 jaroj.

En 1950, la Esp-Movado revigliĝis en Ŝanghajo, kaj eldoniĝis monata gazeto *Popola Mondo,* sur kiu aperies rubriko de traduka konkurso, enl kiu iam mi ankaŭ partoprenis kelkfoje sub la plumnomo Risel. En marto fondiĝis en Pekino ĈEL (Ĉina Esperanto Ligo) kaj en majo eldoniĝis ankaŭ la revuo EPĈ (El Popola Ĉinio) kaj de tiam mi fariĝis ties konstanta leganto dum la daŭro de 50 jaroj.

Mi diplomiĝis el la Universitato en 1951 kaj iris al laborposteno en Wuhan. Pli poste mi vizitis s-anon Zhuang Dong, iaman gvidanton de Esp-Movado en Yan'an. Ni interparolis esp-lingve por duonhoro, dum kiu li kuraĝigis min por plua ellernado de nia lingvo por servi pli bone al la socialisma afero. (daŭrigota)

*S-ano Risel Zhao Qing estas 75-jara esperantisto. Vere kuraĝiga al ni junaj esp-komencantoj estas lia rakonto pri lia esperanta vojo plena je penaj klopodoj. Ni publikigas lian artikolon por inspiri pli multajn junajn adeptojn al altigo de ties esp-nivelo spite al diversaj malfaciloj.*

***Redakcio***

☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺☺

## EL 《*LAŬZI*》



### ĈAPITRO 41

(El la vidpunkto pri kontraŭdiroj Laŭzi citas kelkajn antikvajn popoldirojn por atesti, ke liaj ideoj pri retiriĝo, malforteco kaj nekonkurado plene konformas al la principo de la Taŭo, kiu estas en "senagado".)

Aŭdante pri la Taŭo, la supera klerulo diligente praktikas ĝin.
Aŭdante pri la Taŭo, la meza klerulo duone kredas ĝin.
Aŭdante pri la Taŭo, la malsupera klerulo ridegas pri ĝi.
Se tiu ĉi ne ridegus, tio ja estus kontraŭ la Taŭo!
Tial malnova proverbo diras:
"La Taŭo, kiu estas brila, ŝajnas esti malhela;
La Taŭo, kiu antaŭeniras, ŝajnas retroiri;
La Taŭo, kiu estas ebena, ŝajnas esti malebena;
La supera Virto ŝajnas esti valo humila;
La plej granda honoro ŝajnas esti malhonoro;
La plej granda Virto ŝajnas esti nesufiĉa;
La vigla Virto ŝajnas esti inerta;
La simpla pureco ŝajnas esti ŝanĝiĝema;
La plej granda kvadrato havas nenian angulon[1];
La plej valora vazo ĉiam estas laste finfarita[2];
La plej granda muziko havas apenaŭan sonon[3];
La plej granda bildo estas senforma[4]."
La Taŭo estas kaŝita kaj sennoma,
Sed estas nur la Taŭo, kiu iniciatas ĉiujn estaĵojn kaj kondukas ilin al kompletiĝo.

[1] Per tiu ĉi paradokso Laŭzi aludas la senlimecon de la universo, t.e. de la Taŭo.

[2] Tiu ĉi frazo nun povas metafore signifi ankaŭ, ke la grandaj talentoj maturiĝas malrapiide.

[3] Per tiu ĉi paradokso Laŭzi aludas la neaŭdeblecon de la Taŭo. (Vd. ĉap. 14)

[4] Per tiu ĉi paradokso Laŭzi aludas la nevideblan ĥaosan staton de la Taŭo antaŭ la apero de ĉiuj estaĵoj. (Vd. ĉap. 14)

### ĈAPITRO 42

(La unua parto de tiu ĉi ĉapitro diras, ke la Taŭo estas la ĝenerala fonto de ĉiuj estaĵoj, kaj la dua parto diras, ke resti

malforta kaj retiriĝi estas unu el la plej gravaj principoj en la traktado de aferoj, principo, kiun Laŭzi opinias konforma al la taŭo.)

La Taŭo naskas la Unuon (ion unuecan),
La Unuo naskas la Duon (du kontraŭajn aspektojn),
La Duo naskas la Trion (alion),
La Trio produktas miriadojn da estaĵoj.
La miriadoj da estaĵoj entenas en si la *jin*-on kaj la *jang*-on kiel du kontraŭajn fortojn[1],
Kiuj estas unuecigitaj en harmonion per nevidebla spiro[2].
Oni timas esti "orfo", "soleculo" aŭ "senindulo",
Kaj tamen la reĝoj kaj la dukoj volonte nomas sin mem tiaj.
Tial ĉiuj aferoj povas pligrandiĝi, se oni intence ilin reduktas,
Kaj ili povas reduktiĝi, se oni intence ilin pligrandigas.
Tion, kion oni instruas unu al alia, ankaŭ mi instruas:
"La violentulo certe mortos violentan morton,"
Mi faros tiun ĉi fakton la bazo de mia instruado.

[1] En la ĉina filozofio la *jin*-o prezentas la duonon de la dueco en la universo. La *jin*-o estas la femala forto, asociita kun la ĉielo, la mallumo, la virina sekso, la negativeco ktp. La *jin*-o estas kompletigita de la *jang*-o, la maskla forto, asociita kun la tero, la suno, la lumo, la vira sekso, la pozitiveco ktp. Ĉi tie per la *jin*-o kaj *jang*-o estas simbolata la fakto, ke ĉiu estaĵo estas miksaĵo el *jin*-o kaj *jang*-o, t.e. el mallumo kaj lumo, malforteco kaj forteco, akvo kaj fajro, malvarmo kaj varmo ktp. En la ĉiutaga vivo la *jin*-o estas priskribita kutime kiel virineca, fleksebla, cedema, flua, kvieta, mola, malforta ktp., dum la *jang*-o kiel vireca, rigida, malcedema, decidema, malkvieta, malmola, forta ktp.

[2] Estas tre malfacile trovi Esperantan ekvivalenton por la ĉina filozofia termino *qi*. Ĝi povas signifi "materion", "energion", "spiron" kaj "vitalan spiron". En malsamaj kuntekstoj de ĉina filozofio ĝi estas malsame interpretita. Ĉi tie ni tradukas ĝin per "spiro", kvankam ĝi ne estas plene kontentiga.

elĉinigis **Wang Congfang**

# Poemoj de Beì Dao

## Malpleno

malpleno estas malriĉeco
malpleno estas libereco
en la okuloj de marmora la statuo
triumfo estas ja malpleno
alsvarmas nigraj birdoj el la horizonto
montrante la makulojn antaŭmortajn de morgaŭo
malpleno estas senespero
ĉe l' taso-fundo de amiko
malplen' perfido estas
sur fot' de amatino
enu' malpleno estas
en la letero longe-atendita
malpleno estas tempo
aret' da misaŭguraj muŝoj flugas
sur la plafonon de la hospitalo
malpleno estas historio
Nur genealogi' la daŭrigota
kaj la pasinta gajnos konfirmigon

elĉinigis **Wang Lan**



## Senpenta Homo

tabuaj floroj, herboj
la greno historia estas
sub la ĉielo konk-kolora

paperaj papilioj sonĝas
pri l' famili' de ŝtonoj
en brusto mia la ŝakpeco ruĝainstigas
min antaŭen
mi estas ombr' de reĝo
aŭ peono, mi vualas
de vento kaj nubaro trans la bordo
la emocion
la ratoj de la kvindeka generacio
la longan vipon svingas

elĉinigis **Liu Pei**



## Nokta Reveno

spertinte la alarm-muzikon de aeratako
la veston mi pendigas sur la breton
forprenas l' okulparon hundan
uzita por eskapi
kaj falsajn dentojn, tiuj lastaj vortoj
la malnaivan poŝhorloĝon fermas
la koro garde-protektata
en akvon falas hor-post-hore
verŝajne en mia sonĝ' torpedoj
eksplodus
aŭdiĝas mia timo

elĉinigis **Wei Lai**



## Pri Tradicio

sovaĝa kapro staras sur la klifo
l' arkponto ekde ĝia konstruiĝo
kaduka jam fariĝis
en jaroj kiam la histrikoj multis
jen kiu povis vidi klare l' horizonton
tagnokte, ventosonoriloj
samkiel tatuitaj viroj
malĝojaj, povis ne aŭskulti l' voĉon de prapatroj
silente longaj noktoj fandas sin en ŝtonoj
deziro movi ŝtonojn venas
al montoj, kiuj ondas en lern-libroj historiaj



elĉinigis **Shi Ying**

ضضضضضضضضضضضضضضضض

## ●Ĉinaj Fabloj●

### Imitado al Belulino

*Xi Shi,* fama antikva belulino, havis doloron en sia brusto. Kiam ŝi eliris, ŝi ĉiam portis la mienon kun kuntiriĝaj brovoj. Malbela junulino, kiu loĝis proksime, vidis ŝin kaj pensis, ke ŝia mieno aspektas tre bela. Kiam la malbelulino revenis hejmen, ŝi ankaŭ metis sian manon sur la bruston kaj kuntiris siajn brovojn.

Kiam riĉa viro, ŝia najbaro, vidis ŝin, li firme malfermis sian pordon kaj ne eliris. Kiam malriĉa viro vidis ŝin, li forhastis kun siaj edzino kaj infanoj.

Ŝi nur sciis, ke la brovo-kuntiriĝa mieno estas bela. sed ŝi ne povis trovi la kialon de ŝia beleco.

elĉinigis **Lao San**

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de *Penseo*
Adreso: s-anino Harpina WU
Poŝtkesto 136, Jichang-xi,
Guangzhou, Ĉinio, CN-510403
E-poŝto: harpina@21cn.com
POŜT-KUPONOJ ESTAS BONVENAJ!
…………..
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: Fremdlingva Fakultato, Shantou Universitato,Guangdong515063, Ĉinio
Tel: (0754) 2903012 (hejme)
E-poŝto: ydwei@stu.edu.cn
Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro

◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊